FEDERACION·ESPERANTISTA·ESPAÑOLA H E F

# BOLETIN

Núm. 12

DICIEMBRE 1949

Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

# EN EL UMBRAL DE OTRO AÑO

Al final de cada año, precisamente, celebra el aniversario de su existencia legal la Federación Esperantista Española. Dos años son ya los que cuenta, en el balance de sus actividades, nuestro organismo cultural y técnico: el primero fué de preparación y de ambientación; a la llamada inicial se han ido agrupando, en las listas de adheridos, viejos y conocidos nombres de antiguos esperantistas españoles, cargados de años pero también de saber y de experiencia, junto a nuevos y desconocidos apellidos, repletos de ilusión y de entusiasmo. Somos pocos todavía, pero estamos bien avenidos, porque nos entendemos doblemente, a través de los impulsos pasionales del corazón, y de las serenas reflexiones de la mente.

Estos impulsos y estas reflexiones dan más fuerza, cada día, a la íntima conviccion de que el Esperanto, además de ser una bella idea de mutua comprensión universal, además de funcionar como un perfecto instrumento de la cultura moderna, al servicio del Arte y de la Ciencia, del Turismo o de la Filatelia, además de todo eso, es también, en las relaciones internacionales, un eficaz medio de defensa contra toda servidumbre y dependencia a cualquier lengua extranjera. Este sincero criterio nuestro es el que ha podido ser ya públicamente difundido y aireado, por medio de las jubilosas páginas de nuestro Boletín, durante todos y cada uno de los doce meses de este año, al final dèl cual procede hacer un somero resumen de iniciativas y proyectos para el que, dentro de poco, va a comenzar su reinado:

Confiamos primeramente en el apoyo creciente de todos los actuales adheridos; esperamos que no ha de faltarnos ni su colaboración ni su estímulo, sin olvidar tampoco su aportación económica, tan necesaria en estos tiempos. Si tan sólo una mitad de los socios aumentase voluntariamente su cuota, podríamos publicar todos los meses el Boletín con doce páginas. Así y todo, a partir del próximo, alternaremos un número de ocho con otro de doce. Tampoco faltará, seguramente, en el transcurso del año, la sorpresa de algún otro suplemento literario. Se corregirán, en lo posible, las deficiencias de impresión, aunque el personal que interviene en su confección se esmera y se supera en ello. Con toda su modestia, nuestro Boletín es gustosamente recibido en todos los sitios, y sería inoportuno silenciar las alabanzas que se reciben, con frecuencia y abundancia, de los colegas de otros países.

Tenemos en preparación una nueva gramática, útil y económica, para que, superando la actual escasez de material de enseñanza, puedan organizarse nuevos cursos con eficacia y aprovechamiento. Si todo ésto logramos, lo que en esquema exponemos, daremos por bien empleado el tiempo que, restándolo de nuestro descanso y de nuestras distracciones, hemos dedicado para que el hermoso idioma auxiliar internacional Esperanto sea hoy conocido, apreciado y respetado en toda España.

## ĜOJAN KRISTNASKON

KAJ

## MULTE DA FELIĈO DUM LA NOVA JARO 1950

# EDUKADO, FONTO DE VIRTO

Dum tiuj ĉi tagoj, tra montoj kaj valoj, oni aŭdas senĉese la pafojn de ĉasistoj, kaj oni vidas la ĉashundojn kuri senhalte, serĉante kaj persekutante timemajn bestetojn, obeante sendube al sia natura instinkto. Antaŭ tio, mi pensas, ke ankaŭ ekzistas homoj, kiuj same, kiel tiuj hundoj, obeas nur al siaj malbonaj pasioj. Oni diras ordinare, ke ĉiu besto aŭ ĉiu persono havas sian propran instinkton, kiu povas esti bona aŭ malbona, sed ĉiam nepre ĝi estas montrata.

Nun mi demandas: ĉu eblas dresi aŭ modifi tiujn instinktojn pere de efika kaj oportuna edukado? Mi opinias, ke jes; eĉ la plej fiaĉa instinkto estas ebla por modifoj kaj ŝanĝoj; eĉ kvankam nur supraje, kvazaŭ brila ŝildo antaŭ la socio... kiel bedaŭrinde ofte okazas. Pri tiu ĉi temo, venas al mia memoro jena historieto, kiun mi volas rakonti, ĉar mi opinias, ke ĝi estas instrua:

«Foje, al la fama Likurgo, reganto en Esparto, oni petis, ke li faru paroladon pri utilo de la edukado. Konsentis la saĝa leĝisto, sed li petis unu jaron da tempo. Likvidita la prokrasto, Likurgo sin prezentis ĉe la publika placo, kie la popolo avide lin atendis. Li venis kunportante du leporojn kaj du ĉashundojn; neniu komprenis por kio, sed Likurgo subite liberigis leporon kaj tuj poste hundon; ĉi tiu sin ĵetis kontraŭ la viktimon kaj mortige ĝin kuratingis. Post tio, li donis liberon al la aliaj leporo kaj hundo; ĉi tiu hundo tute ne agis kiel la antaŭa ĉar, anstataŭ tio, ĝi alproksimiĝis al la leporo kaj ĝin karesis kaj eĉ komencis ludi kun ĝi, kiel bonaj amikoj. Tiam Likurgo jene parolis: Vidu ĉiuj la efikon de la edukado! Tutan jaron mi pasigis edukante ĉi tiun hundon, instruante al ĝi ne trakti malbone la leporojn. La alia hundo ne estis edukata, pro tio ĝi obeas nur siajn krudajn instinktojn. Nu, same kiel vi ĵus vidis, la homo sen eduko sin lasas nur gvidi de siaj pasioj, dum la homo kun eduko agas laŭ sia saĝo kaj kompreneme, semante bonon ĉien ajn. Jen, elektu nun, kion vi volas! La popolo entuziasme portis lin triumfe surŝultre, kaj de tiam ĉiuj sin dediĉis zorge al la edukado de siaj gefiloj».

*JOSE MOLINA BOLINCHES*

**Alfara de Algimia (Valencio)**

# Cual debe ser la labor actual de los esperantistas?

**Recordemos que, cuando el Dr. Zamenhof lanzó al mundo su invento, no se propuso que esta lengua auxiliar fuese utilizada para fines materiales, sino que, valiéndose de ella, empezó a predicar su «interna ideo», que en esencia está contenida en la frase de Jesucristo: «Amaos los unos a los otros».**

**En uno de los primeros congresos apareció una mayoría contraria a esta «interna ideo» pretendiendo tan solo «la praktika uzado» del Esperanto y la creación de «fakaj asocioj». Desde entonces Zamenhof figuró en los congresos solamente «kiel Honora Prezidanto», pero sin intervenir en las discusiones.**

**Al empezar la primera gran guerra en 1914, vimos cómo nuestros corresponsales, los esperantistas alemanes, nos enviaban, sin habérselos pedido, folletos de propaganda germana: los franceses, al darse cuenta de ello, quitaban esos folletos en Esperanto y metían en las fajas periódicos satíricos con caricaturas ofensivas para sus enemigos.**

**A pesar de ello no se escarmienta, y cuando en el verano de 1935 se nos invitó a hablar en una reunión esperantista de Londres, aprovechamos la ocasión para explicar nuestra opinión acerca de la «interna ideo» que calificamos como «fraterna», terminando con las siguientes palabras: «Kiam kreskas la esperantistaro malkreskas la malbono».**

**Lo ocurrido en la segunda guerra mundial, y lo que está sucediendo actualmente en todas partes, en que se prepara una tercera guerra, mucho más terrible que las anteriores, demuestra que estábamos equivocados y nos lleva a dirigirnos a los samideanos, que no son todos los que utilizan el Esperanto para sus asuntos personales, sino solamente aquellos que conservan las ideas del Maestro, rogándoles que orienten su labor hacia una Humanidad donde pueda decirse: «Paz a los hombres de buena voluntad». Y aunque la guerra sea inevitable, hay que inculcar a los combatientes el antiguo espíritu caballeresco que les haga evitar sacrificios inútiles.**

**MIGUEL RIBAS DE PINA VIVES**

**Por la nacia eduko estas nepre necesa la nacia lingvo; sed, ekster la kadro de la propra nacio, same necesa estas la internacia lingvo Esperanto!**

# HISPANISMOJ EN ESPERANTO

En «ESPERANTOLOGIO» n.° 1, (tion mi legis en «Scienca Revuo») nia eminenta samideano Regulo Pérez skribas pri hispanismoj en Esperanto kaj li mencias *Eldorado, Donĥuano, Don-Kiĥoto, Gerilo, Kaŭdilo,* kaj *Toreadoro* aŭ *Taŭristo.* Ne ĉiuj tiuj novismoj (kial diri neologismoj?) plaĉas al mi, sed li povus aldoni, ĉar ili estas hispanismoj jam oficialigitaj, *Majoliko* el Majorko, *Mahoneco,* el Mahon, *Kanario* el Kanariaj Insuloj, k. t. p. La elkovro de Ameriko igis nin disvastigi tra la mondo, per nomoj pli malpli similaj al la indiĝenaj sonoj, amason da vortoj tiel gravaj kiel *maizo, kafo, ĉokolado,* kc.

Estas ankoraŭ skribota, li povus tion fari, la influo de la hispana lingvo en Esperanto. Iuj aŭtoroj, inter ili la rusa Varamkin en lia Teorio de Esperanto (1929) diras, ke el niaj 2629 radikoj fundamentaj estas nur fremdaj :

| | | |
|---|---|---|
| al franca lingvo | 340 | aŭ 13 % |
| al angla lingvo | 780 | — 30 % |
| al germana lingvo | 824 | — 32 % |
| al rusa lingvo | 1512 | — 60 % |

Li diras eĉ nenion pri la hispana, por li ne interesa, kiam fremdaj al ni estas nur 10 %, malpli ol al iu ajn.

Iam mi verkis gramatiketon esperantan en hispana lingvo kaj nia altŝatata samideano doktoro Privat skribis al mi pri ĝi : «Vere, ne estas lingvo pli simila al Esperanto ol la hispana lingvo». Kaj tiel estas! Zamenhof, tamen, ne studis la hispanan lingvon ; tion li konfesis, kiam li estis en Barcelono dum 1909, sed amaso da judoj, kiu scias ĉu li ankaŭ!, estas influitaj de la hispana lingvo en diversaj nacioj. Kompetenta hispana samideano, jam mortinta, opiniis pro tio ke Zamenhof, verŝajne, devenas el hispanaj prapatroj, sed mi ne konas lian genealogion. Ĉu doktorino Wanda Zamenhof povus diri ion pri tio? Zamenhof, reale, havis profunde la internacian hispanan senton kaj eĉ la genion de la hispana lingvo. La hispana lingvo ne havas sole tiujn 90 % da radikvortoj komunaj kun Esperanto, grandparte grekolatinaj ; sed atentinde multaj aliaj estas tipe hispanarabaj.

Kompreneble, tio estas granda gloro por la araboj, niaj antaŭaj kunvivantoj en la duoninsulo dum ok jarcentoj. Neniu povas diskuti liajn meritojn : la araboj elpensis la nombradon per ciferoj internaciigitaj, la vorto cifero mem estas arabdevena ; la araba Akvarismo en 825 elpensis nomon kaj fakon «Algebro» ĉe verko aperinta en Bagdado ; la alkemio, sekve la kemio, estis elpensita de ili, kies nomon ili prenis de Egipto, kie ili rilatis kun la egiptanoj intime, en serioza kunlaborado ankoraŭ ne klarigita de historiistoj ; ili elpensis arkitektadon kun elementoj kaj nomoj internaciigitaj : kiel *alkazaro,* kiel *moskeo,* kiel *minareto,* k.t.p. ili industriigis la agrikulturon per sistema akvumado kaj arabaj vortoj estas *rizo, sukero, jasmeno, safrano...*

........................................................

La hispana lingvo kun la araba malsamlitera, kiel aliflanke la latina lingvo kun la greka, ankaŭ malsamlitera, influis grandkvante en la internacia kulturo, sekve en la lingvoj, sekve en Esperanto ; sed pri la unua parto neniu priokupiĝis. Iam mi ĝin detalos, se tio interesas iujn.

AZOR

La aludita artikolo de nia samideano Régulo Pérez ne temis pri hispandevenaj vortoj, sed pri «Hispanidaj neologismoj en Esperanto». (Noto de la Redakcio.)

---

**KARA SAMIDEANO** **Ne nur almanako, sed la kruda vetero, kaj la proksimeco de Kristnasko, avertas jam, ke ni staras apud la sojlo de nova jaro. Tio signifas, krom diversaj aliaj konsideroj, ke vi devas renovigi tuj vian kotizon. Tio estu por vi ne seka nek simpla plenumo malvarma de devo, sed agrabla ago kun kelke da fiero kaj multe da honoro. Konsciu, ke via mono estas treege necesa por akurata aperado de nia Bulteno, tiel same utila por via lingva perfekteco, kiel por akstera rilato kun la esperantista mondo. Ne hezitu nek atendu tro longe! Varbu novajn abonantojn! Neniu hispana esperantisto devas izole vagadi ekster la densaj vicoj de la Hispana Esperanto-Federacio! Ni ekiru en la novan jaron kun nova energio kun nova kreskanta fervoro kaj nova entuziasmo!**



**Lazaro Ludoviko ZAMENHOF**

**Aŭtoro de ESPERANTO**

Sajnas fatala decido de la sorto, ke nomoj de plej grandaj elpensintoj estas nur misfame konataj en la komenca periodo, kiam rikanoj kaj mokoj estas la sola akompano de genio, en la dorna vojo de lia firma konvinko. Poste, kiam la invento estas akceptata, kiel ordinara bezonaĵo, paliĝas pli kaj pli la nomo de ties kreinto... Nu, ankaŭ D-ro. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto, en la frua epoko de nia lingvo, estis honorata ĝis ekstremoj de apoteozo, sed en la lastaj jaroj evidentiĝas ia forgeso al lia memoro, kiu ne kongruas kun la patosaj vortoj de antaŭa tempo. Estas devo nia honorigi la nomon de tiu persono, kiu obstine kaj pacience, fervore kaj sindoneme, elpensis kaj cerbumis pri la mirinda meĥanismo de tiuj dekses reguloj, kiuj konsistigas la plej grandiozan verkon, kiun en la kampo de la lingvistiko iu homo povis iam fari. Tiu homo estas nia kara Majstro, kiu ĝuste, je la 15^a^ de Decembro, ĉi-jare, se li ankoraŭ vivus, estus garnita per la serena aŭreolo de naŭdek jaroj. En la solena dato de lia naskiĝo, la malnovaj hispanaj esperantistoj admonas la novajn generaciojn amase kunveni, ĉirkaŭ ili, por digne omaĝi la memoron de la glora kreinto de Esperanto.

# INTER LA PROZ

En kontrasto kun la somero, la vintro estas ŝparujo de energioj; oni avaras la fortojn, la senutilajn gestojn kaj eĉ la vortojn. Sed oni emas mallaŭte kaj kviete babili, apud forno, pri intimaj doloroj kaj ĝojoj; vere, la vintro estas danĝera sezono, ĉar abundas kataroj kaj malkovriĝas sekretoj... laŭ fluo de ripoza babilado, en agrabla interŝanĝo de seriozaj aŭ banalaj konfidencoj. La homo ja ne ŝatas gardi sekretojn, ili estas peza ŝarĝo por la animo; sed la homo, bedaŭrinde, perdis fidon je la homo, pro la fia egoismo, kiun trudas nuntempe la kruda batalo por la vivo, kiu izoligas spirite la personojn eĉ inter la densaj amasoj de la grandaj urboj. Tamen, tuj en oportuna okazo, kiam parencaj koroj rendevuas, per la etera materio de susuroj kaj flustretoj, glitas eksteren, unu post alia, vualitaj pensoj, kaŝitaj intencoj, kovritaj deziroj. Ho... ho, kiel mallerte ĵonglis mia krajono per tiuj filozofiaj eretoj, dum frosta ventego ululas kaj terurigas la timemajn bestetojn de la arbaro, kiuj kunpremiĝas en siaj kaŝejoj, por ricevi varmon unu de la alia. Mi ankaŭ sopiras al dolĉa akompano de anim' al animo; nur iel mi trovas konsolon legante la paĝojn de kelkaj gazetoj, kiuj en gajaj salutoj pri Novjaro kaj proksima Kristnasko portas aromojn el nordaj arbaroj, kie neĝo kaj abio estas bonaj kamaradoj. Mi konfesas al vi —konfidence!— ke laca mi estas jam nun, antaŭ ol komenci; via sentima pardonemo indulgos min, je troa penado, en la adiaŭa strofo de mia tutjara lirika poemo; ĉar, ankaŭ plej certe, pro nia bonvolo, la nevidebla fadeneto, kiu nin interligas, neniam rompiĝos, neniel ĝi ja nin perfidos, en la komisio ligi la realon kun la fantazio.

Sed, kie situas la limoj de ĥimero kaj sonĝo, se ne tie mem, en nia efektiva ĉeesto, en nia akurata vizitado? Tiel ŝajnas paroli, per pepa voĉeto, la kolekto da gazetoj, kiuj min rigardas kun la malica grimaceto de siaj titoloj.

# DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

Jes, ili pravas ,ĉar ili estas, por ĉiu esperantisto, realo de la fantazio kaj fantazio de la realo. Al ili do mi min turnas, kaj ili mem sin prezentas:

ESPERANTOLOGIO, en sia unua numero praviĝas la esperojn, kiujn pri ĝi oni havis. Kun eleganta kaj serioza aspekto, kun altvalora enhavo, ĝi estas nun la ĉefa periodaĵo en nia lingvo. Speciale interesa estas, por hispanoj, la bonega artikolo de nia amiko J. Regulo Pérez, sub la titolo «Hispanidaj neologismoj en Esperanto», kie prave li diras: «Dum legado de esperantaĵoj, mi trovis kelkajn vortojn, kiuj elvokis en mia spirito sian hispanajn praulojn, kvankam preskaŭ neniam ili atingis la esperantistan arenon rekte el Hispanio. Tial, ke ĝis nun mankis en Esperantio elstaraj hispanaj figuroj, kiuj estus influintaj la esperantistan literaturon». Bonaj, bonegaj estas liaj klarigoj pri *Donhuano* kaj *Don-Kiĥoto*. Ankaŭ tre kurioza, tiu pri *toreadoro*. En la lasta numero de ESPERANTO, la konata samideano M. Stuttard trafe parolas «Ankoraŭ pri neologismoj», ĉe la fino, sprite li diras: «Inter la esperantistoj troviĝas homoj. kiuj ĵargonigas nian lingvon en la nomo de arto. Por ili Esperanto ĉesis esti provo de lingvo internacia, sed fariĝas nura artobjekto, kiun ili povas manipuli kaj tordi laŭ sia bontrovo, laŭ la maniero de la «modernaj» pentristoj antaŭ kies tolaĵoj gapadas rondoj da gejunuloj, firme kredantaj, ke ili staras en la avangardo de la progreso». LA SKOLTA MONDO aperas unuan fojon en mia rubriko, ĝi estas oficiala organo de Skolta Esperantista Ligo. Inter fakaj artikoloj, estas kelkaj literaturaĵetoj tre belaj. Por la personoj fremdaj en la skoltismo, estas kuriozaj subskriboj, kiaj: *Zigzaganta Hipopotamo, Matena Roso,* k.c. Jen ankaŭ nova vizitanto LA GUSTA VOJO, ĝi estas zorge aranĝita cirkulero por katolikaj esperantistoj; apud la titolo estas la stelo ornamita de kruco. Tra ĝiaj paĝoj aperas fragmentoj de la evangelio, gravaj sciigoj por la katolikoj kaj eĉ morale amuzaj spritaĵoj. Plia novulo estas MAROKA ESPERANTISTO, bulteno de franca Maroka Esperanto-Asocio, kun utilaj propagandaj artikoloj en franca lingvo. Jen tria numero de VOĈO DE ISLANDO ,pli bela ol la antaŭaj, kun zorge elektitaj specimenoj de la islanda literaturo, la preso kaj la aranĝo estas senriproĉaj. De alia ekstremo de Eŭropo venas vigle INTERNACIA KULTURO; nepre leginda kaj studinda, por ĉiu esperantisto, estas la artikolo «Fluktuado en nia Movado». SENNACIULO aperas regule, kiel ĉiam, kaj tamburas jam por sia 23ª Kongreso en Torino. Du seriozaj artikoloj meritas atenton: «Skizeto pri vera homo» kaj «Kresko de la loĝantaro.» SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN raportas pri la sukcesaj prelegoj kaj paroladoj, kiujn tra Svedio faras nia egipta kaj fervora samideano Tadros Megalli. Nia sperta kaj ŝatata HEROLDO DE ESPERANTO fermas la liston hodiaŭ per la demando-signo de sia jukanta artikolo «Kio estas Civilizacio?»

Jen angora demando, ĉar estas diversaj formoj de civilizacio: materia, intelekta aŭ morala; sed pli grava nun la demando, ke multe frostas, kaj la korpo bezonas varmon; tial, por ĝin konservi, la homoj sin envolvas per teksaĵoj el la lano, kiun oni prenis per tondado al la humilaj ŝafinoj, kvankam ankoraŭ pli malfeliĉaj la bestoj, al kiuj oni prenis la felon, kaj eĉ ankaŭ la haŭton... En luksaj stratoj de la grandaj urboj, viroj kaj virinoj fariĝas remburaĵo, por peltoj kaj surtutoj. En la arbaro, la modo ne ŝanceliĝas; saĝa tajloro estas la naturo, kiu scias vesti ĉiun vivan estaĵon per belaj kostumoj, ĉiam adekvataj al ties bezonoj. Ho, denove, iomete mi devas konfidenci, por diri, ke vulgare mi tremas pro frosto, ĉar bedaŭrinde ne sufiĉa kovrilo estas ja la barbo, kiu maskas la vizaĝon de via amiko kaj servanto

LA LEGEMA KOBOLDETO

# SUCEDIDOS

Era ya el año 1907 cuando me encontraba accidentalmente en Cartagena y se trataba de organizar en dicha ciudad un curso de Esperanto. Un muchacho se encargó de traer de Murcia, donde vivía entonces un propagandista muy entusiasta, los libros de enseñanza necesarios. Quiso regalar un ejemplar a una señorita, amiga suya, y nos pidió que redactásemos la dedicatoria. Escribimos : «Al la estonta glora esperantistino Fulanita de Tal». La niña, al leerlo, se enfadó mucho porque creyó que la habíamos llamado «tonta», y nos costó un trabajo enorme convencerla de que «estonta» en Esperanto no significa otra cosa que «futura»...

---

Pocos años después, una linda muchacha, discípula ya adelantada, en un curso de «Esperantista Klubo Palma», me dijo : —Fulanito es un grosero, pues me ha llamado «ĉarmulino», y analizando esta palabra compuesta «ĉar-mul-in-o» significa «Mula de carro». El análisis está bien hecho, le contesté, pero si el primer guión lo corres una letra a la derecha resultará entonces : «ĉarm-ul-in-o», que es lo que ha querido decirte el muchacho, y es precisamente lo que tu eres : «encantadora».

MALJUNA ESPERANTISTO

# RIKARDO STRAUS kaj NI

La fama germana muzikisto, jus forpasinta, multe amis nian landon, kaj vizitis ĝin plurfoje. Dum restado en Barcelono, hispana pentristo demandis lian opinion pri hispanaj pejzaĝoj.

Strauss respondis : «Hispanio estas tiom diversa, interesa kaj kolorplena, ke, pri ĝi, oni povas komponi muzikan albumon, kies paĝoj estos plej harmoniaj kaj multkoloraj».

Kiam li estis laborante por sia muzika poemo «Don Kiĥoto», oni demandis al li ĝis kiom li fantaziis pri la verko. La fama komponisto respondis : «Fantazio kreas muzikon ; la verko de Cervantes estas tiom fantaziplena, ke mi nur bezonas transskribi muzike tiujn nekompareblajn scenojn».

# AGRABLA RENKONTIĜO

Ne tre ofte oni trovas homon, kiu fiere portas nian verdan stelon en urbo, kie ne ekzistas esperantista anguleto. Tio estas nekutima floreto en multaj lokoj, pro manko de necesa propagando. Sciante, tamen, ke okaze venas samideano al sama urbo, kiel mi, kun granda atentemo mi serĉis lin. Silente mi *promenadis tra ĉefa* placo, observante ĉiujn por vidi la atendatan personon. Dum longa horo, multe mi memoris pri la pasintaj jaroj, kiam kelkaj amikoj aktive propagandis nian lingvon. Ili nun malaperis aŭ foriris. Subite alproksimiĝas sinjoro ; li venas rekte al mi. videbla estas nia insigno : tiu floreto pri kiu komence mi skribis.

—Ĉu vi estas sinjoro Rivelles? Treege mi ĝojas saluti vin, ĉar mi ankaŭ estas samideano.

—Dankon! Ĉu vi estas de Almatret ?

—Jes, vi divenis.

Jen tuj forta manpremo, kun iom da surprizo, ĉar li ne esperis renkonti min. Post la salutoj multaj demandoj fluas. Ho, kia ĝojo estas paroli kun lerta amiko per nia kara lingvo! Ni rendevuas post la tagmanĝo ; mi memoras pri aliaj renkontiĝoj, sed hodiaŭ la feliĉo estas plia, ĉar mi povas aŭdi kaj multe paroli nian lingvon. Tial, plene kontenta mi marŝas ĝis la rendevuejo : granda kafejo, kie kunvenas urbanoj kaj vilaĝanoj. Estas bruo kaj fumo el la cigaredoj. Ni sidas ĉirkaŭ tableto kaj trinkas kafon ; tre atente ni parolas, dum niaj najbaroj ludas aŭ diskutas. Diversaj temoj agrabligas la konversacion ; sed ĉefa atentemo estas dediĉita al nia kara Bulteno, kiun ni deziras pligrandigi kaj plibonigi en ĝia enhavo. Por H. E. F. ni estas pretaj atingi multe da membroj.

La konversacio longe daŭris ; sinjoro Rivelles, vera aktivulo, montris intereson pri mia intenco fondi grupeton. Mi scias, ke li jam sukcesis organizi kursetojn kaj injekti entuziasmon. Mi volas fini ĉi tiun artikoleton per liaj propraj vortoj :

—Tie, kie mi pasis aŭ loĝis, ĉiam postrestis esperanta makulo... !

MIGUEL TARRAGO (Veleto)

## EL ESPERANTO Y EL CATOLICISMO

**El día 2 de Octubre tuvo lugar en Roma la 3.ª reunión anual de los esperantistas católicos italianos, tomándose decisiones para el mayor éxito del 22 Congreso Universal de los Esperantistas Católicos, que tendrá lugar, en la Ciudad Eterna, del 10 al 17 de Agosto de 1950, con motivo del Año Santo. «La Guía del Peregrino» ha sido editada en Esperanto, así como otras hojas de información. Con motivo de este acontecimiento va a reaparecer «Espero Katolika» (La Esperanza Católica), órgano de I. K. U. E. (Internacia Katolika Unio Esperantista) tan comprensible es este título para los españoles, que no precisa traducción. Uno de los mejores predicadores en Esperanto es el sacerdote austríaco, padre Bruno Hebenstreit, se distinguió sobremanera en el último congreso austríaco, el verano pasado, por su sermón «San Francisco de Asís, patrón de los esperantistas católicos», durante la misa oficiada en la Iglesia de las Ursulinas de Graz. Se prepara la edición del 5.º «Directorio Universal de Esperantistas Católicos» por el Sr. Lorcan O'h Uiginn, a quien pueden escribirle los interesados, solicitando detalles, a la siguiente dirección: Sr. LORCAN O'H UIGINN, Bothar Glasard, 16 DUBLIN (Irlanda). Diremos por último que, a últimos de Noviembre, hemos tenido en Valencia la grata visita del padre misionero español Félix De Valois Arana, de paso para el extranjero. Solo pudimos disfrutar de su compañía durante breves instantes, que fueron suficientes para apreciar su simpatía y su fervoroso entusiasmo por el Esperanto, pues, como él decía: «Nosotros, los misioneros, que hemos de ejercer nuestro apostolado, entre indígenas de apartadas comarcas, sabemos por experiencia la falta que hace un idioma auxiliar internacional para todo el mundo». Deseamos al padre Arana un feliz viaje.**

# FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● ALEMANIA.—En Hamburgo ha tenido lugar un curso para guardias municipales; actualmente 24 de ellos prestan servicio con distintivo esperantista para los turistas. La Red Federal de los Ferrocarriles alemanes mantiene oficialmente cursos del idioma internacional para todos sus empleados y una oficina de información y turismo.

● HOLANDA.—La Real Academia Holandesa de Ciencias ha aceptado que en sus puublicaciones, se hagan constar resúmenes en Esperanto. El astrónomo holandés doctor M. Minnaert, en su reciente libro «De sterrekunde en de mensheid» (La astronomía y la humanidad) en la página 52, refiriéndose a la diversidad de lenguas, dice: «Solo la adopción de una lengua mundial, cual es el Esperanto, da solución satisfactoria para todas las ciencias».

● DINAMARCA.—Organizado por el Club Esperantista Estudiantil de Copenhague, ha tenido lugar, durante una semana, un viaje de estudios para estudiantes extranjeros, visitando las más importantes ciudades un nutrido grupo de estudiantes esperantistas de cinco naciones. Para la próxima primavera se prepara una nueva reunión a la que asistirá una numerosa representación de los estudiantes alemanes. El famoso rotativo «Politiken» editó no hace mucho una bonita pequeña enciclopedia, sobre el país, en Esperanto, titulada «Faktoj pri Danlando» (Hechos acerca de Dinamarca) la primera tirada de 5.000 ejemplares acaba de agotarse, y ya está en prensa la segunda. La Comisión Municipal de Educación en el Ayuntamiento de Aarhus, ha decidido someter a prueba la enseñanza del Esperanto en las escuelas, en substitución del inglés.

● FINLANDIA.—La Academia de Biología tiene en proyecto un viaje de estudios por Europa durante la próxima primavera. Es muy interesante el detalle de que para la organización de este viaje y del plan de recorrido solo se ha empleado, como idioma base, el Esperanto.

● BRASIL.—La Sociedad de Estadística de Santa Catalina acaba de adoptar el Esperanto como lengua oficial para sus relaciones con el exterior.

● JAPON.—En el primer tomo del libro de lectura del Idioma Japonés, editado por el Ministerio de Educación; hay todo un capítulo dedicado al tema «Idioma internacional» escrito expresamente por el activo esperantista Mijake Sihej.

## NUESTRO REGALO DE NAVIDAD Y AÑO NUEVO

**Junto con el presente número del Boletín, recibirán nuestros lectorse un bonito suplemento literario con la traducción en Esperanto del capítulo XXII de «El Ingenioso Hidalgo Don Quijote de la Mancha», como muestra de la versión completa, que se está llevando a cabo. Creemos que esta especie de aguinaldo será del agrado de todos, y que todos también sabrán apreciar nuestros buenos deseos, encaminados a proporcionar a los esperantistas españoles una grata lectura, para su propio recreo, y un interesante medio de propaganda, entre el círculo de sus amistades.**

**Considerando, además, que este suplemento puede ser un buen regalo de Pascuas, para los corresponsales extranjeros, tenemos a la disposición de nuestros amigos una pequeña reserva de ejemplares sueltos al precio de DOS pesetas cada uno, a fin de que también el Esperanto sea heraldo por el mundo entero de los valores inmortales de la literatura española. Los pedidos serán servidos con prontitud.**

## INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO

de la Tutmonda Junular-Organizo okazos, dum 8 aŭ 10 tagoj en Julio ĝis Aŭgusto 1950, en la ĉarma germana urbo Konstanz. Oni povas peti sciindajojn, kontraŭ respondkupono, ĉe la Loka Organiza Komitato, laŭ la adreso: Grüngang, 9 Konstanz (Germanio). Prospekto en Esperanto povas esti petata senkoste de «Städt. Verkehrsamt Konstanz».


## IMPORTANTE

Acaban de aparecer dos interesantísimos opúsculos del Profesor **Manuel Fernández Menéndez:**

**El Esperanto en la opinión de hombres eminentes y algunos hechos**
(2.ª edición, muy aumentada). Un folleto con nutrido material, de gran eficacia para la propaganda . . . . . . . 2 rpk.

**Valor educativo del Esperanto**
Notable estudio de 40 págs. (24 x 16), ilustrado con 10 fotograbados. . . . 4 rpk.

DESCUENTOS: Desde 10 ejemplares, 40 %

Envíe sus pedidos con el importe al editor:

**LA BONA SEMISTO - Poste restante.-MONTEVIDEO (Uruguay)**



## ANONCETOJ

**Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.**

DR. E. TUDELA.—Ruzafa, 43. Valencia. Dez. koresp. kun ĉiulandánoj pri div. temoj. Respondo garantiata.

ANTONIO PASTOR. Ercilla, 49, 5.°, Bilbao (Hispanio). Dez. interŝ, il. pkt. eksterlande. Certa respondo.

DENTTEKNIKISTOJ!—S.° Ricardo de Luna, dez koresp. pri metiaj k. ĝen. aferoj kun eksterlandanoj. Paseo de Colón, 5, 1.°, 2.ª Barcelona (Hispanio).

RAFAEL VIZCAINO. C. Maluquer, 5, pral. S.ª Valencia. Dez. interŝ, p. m. kun ĉiuj landoj. Serioza propono.

JOSE NAVARRO. Calle Llull, n.° 208, 4.°, 1.ª, Barcelona, deziras koresp. kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj. Nepra respondo!


## BELA NOVJARA DONACO

Estas la aparta aldono, en la nuna numero, kun la esperanta traduko de la 22ª ĉapitro de «La Genia Kavaliro Don-Kiĥoto de Manĉujo».

Unu ekzemplero, por eksterlando, 2 respondkuponojn. Mendu al nia adreso.

La mejor manera de favorecer al Esperanto en España es inscribiéndose en HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

| | | | |
|---|---|---|---|
| Socio de número ... | 12 ptas. anuales | | |
| Socio abonado.. ... | 25 | » | » |
| Socio protector... ... | 50 | » | » |

Las dos últimas categorías dan derecho a la recepción de nuestro «Boletín»

FEDERACION·ESPERANTISTA·ESPAÑOLA
H E F


# HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


RUZAFA, 7 VALENCIA (HISPANIO)


Valencia, Noviembre 1949

*Sr. D.* ........................................

Distinguido amigo y samideano:

De acuerdo con el vigente Reglamento procede la elección, en su totalidad, de la actual Junta Directiva, que ha venido funcionando hasta ahora con carácter provisional.

Teniendo en cuenta la dificultad que representa el hecho de no conocerse directamente todos los asociados, nos hemos permitido confeccionar una candidatura que sometemos a su consideración, creyendo que por la calidad y solvencia de sus componentes, garantiza el éxito de las tareas en pro del Esperanto en España.

Le rogamos pues que, a la mayor brevedad, nos remita la adjunta papeleta, debidamente cumplimentada, a fin de que obre en nuestro poder antes del día 10 del próximo Diciembre; en esta papeleta, naturalmente, puede ser sustituído por otro cualquier nombre, a su libre voluntad o mejor criterio.

Agradeciendo su valiosa aportación en favor del bello idioma internacional, le saludamos atentamente

Federación Esperantista Española
El Secretario Provisional,
VICENTE SANTAMARIA

---

*D.* ........................................ *socio n.º* ..........

*habitante en* .................... *provincia* .................... *propone como Junta Directiva de la Federación Esperantista Española, a los componentes de la siguiente*

## CANDIDATURA

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Presidente | – | **D. Manuel Caplliure Ballester** | – | (Valencia) |
| Vice-Presidente | – | **D. Federico Ribelles Giménez** | – | (Sevilla) |
| Secretario | – | **D. Vicente Santamaría Lloréns** | – | (Valencia) |
| Vice-Secretario | – | **D. Sebastián Chaler Arnau** | – | (Tarrasa) |
| Tesorero | – | **D. Francisco Roglá Orrico** | – | (Valencia) |
| Vocal 1.º | – | **D. Daniel Lloréns Sastre** | – | (Valencia) |
| » 2.º | – | **D.ª María Casasnovas Jarreta** | – | (Zaragoza) |
| » 3.º | – | **D. Miguel Ribas de Pina Vives** | – | (Santander) |
| » 4.º | – | **D. Fernando Montserrat Boronat** | – | (Barcelona) |

.................... *de* .................... *de 1949.*

FIRMA,